# *Guterres rifuzis la decidon de Trump ?esigi financadon al la OMS*




Nov-Jorko, apr 15 (RHK) La ?enerala sekretario de la UN, António Guterres kritikis la decidon de la administracio de Donald Trump ?esigi la fonduson de la monda organizo pri sano (OMS), esprimante ke "ne estas la momento" por tion fari, kiam la mondo batalas kontra? la pandemio de la kronviruso.

"Ne estas la momento redukti la rimedojn por la operacioj de la OMS a? de iu ajn humanitara organizo en la batalo kontra? la kronviruso", asertis Guterres per komuniko diskonigita en la retejo de UN.

"Estas momento unui?i kaj por solidara laboro de la internacia komunumo cele al bremso de tiu ?i viruso kaj ties detruaj sekvoj", li aldonis.

Guterres faris tian deklaron post kiam Trump anoncis ke ?esos transdoni fonduson al la organiza?o.

La usona ?tatestro petis esplori  la rolon de la OMS en la malbona mastrumado kaj ka?ado de la ekspansio de la kronviruso. Li akuzis la organiza?on pri “eraroj”, kiuj provokis “multajn mortintojn”.

Guterres emfazis ke la subteno de la OMS kaj de miloj de ties laboristoj “en la unuaj frontlinioj” de la batalo kontra? la epidemio “estas absolute esenca por la klopodoj de la mondo cele  venki  tiun ?i batalon kontra? Covid-19.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/219800-guterres-rifuzis-la-decidon-de-trump-cesigi-financadon-al-la-oms

**Radio Habana Cuba**